

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Prof. D-ro Ing-ro R. Orengo. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114)

VOLUMO I * N-RO 2

MARTO 1932

Survoje al Konsilanta Gramatiko.

En la enkonduka artikolo de Lingva Kritiko n-ro 1 la Redakcio skribis i. a. ke „la bazo de Esperanto estas ĝia gramatiko, konsiderinde pli facila ol tiu de iu nacia lingvo, sed en la detaloj ne ĉiam egale interpretata de la diverslingvaj uzantoj de Esperanto. Aŭskulti kaj kritike ekzameni la opiniojn de diverslingvaj kompetentuloj, fari niajn konkludojn kaj, fine, kiel rezulton de nia laboro, prezenti al la uzantoj de Esperanto gramatikon, kiu donu informon kaj konsilon en plejble multaj dubaj kazoj, — jen la tasko de la gramatika parto de nia revuo.“

Ĉi tiuj linioj klarigas, ke per la gramatika parto de Lingva Kritiko ni ne celas nurajn teoriajn diskutojn, sed ke ni sekvas per ĝi difinitan praktikan celon. Nia ideo estas, preparoli kaj priparoligi detalojn de la gramatiko de Esperanto kaj poste utiligi la rezultojn por kompetenta gramatika verko. Komence ni intencis, paragrafon post paragrafo pritrakti la tutan gramatikon, prenante kiel bazon la Fundamentan Gramatikon de Esperanto aŭ iun el la jam ekzistantaj gramatikoj aŭ lernolibroj: Fruictier, Velten, Göhl (baldaŭ aperonta), aŭ alian. Sed eble estas preferinde, en la unua tempo limigi nin je tio, ke ni elmontrons ekzemplojn ĉerpitajn el la praktika lingvuzo, kiuj ŝajnas eraraj, neklaraj aŭ nekutimaj, kaj ke ni koncize priparolos aŭ priparoligos ilin. Poste ĉiuj ĉi ekzemploj povos esti kolektataj, registrataj kaj utiligataj por la verkado de «Konsilanta Gramatiko». Ĉi tiu estos gramatiko, kiu ne diktatore ordonas sed kiu, precipe en dubaj kazoj, donas konsilojn pri tio, kio estas pli taŭga, kio estas malpli taŭga kaj kio estas tute evitenda.

Ni komencas ĉi-malsupre per la citado — en formo de lingvaj demandoj — de aro da frazoj kaj formoj, trovitaj de nia redakcio aŭ de aliaj samideanoj en iu libro, artikolo, recenzo, letero ktp. La respondojn ni aldonos mem; sed ni petas ankaŭ la kunlaboradon de niaj kompetentaj legantoj. Sendante demandon aŭ demandojn bonvolu ĉiun unuopan demandon skribi sur aparta folieto aŭ karto kaj ĉiam aldoni, ke ĝi temas pri la Konsilanta Gramatiko; se eble, indiku la precizan fonton, kie vi trovis la koncernan frazon aŭ formon.

Sendante respondon aŭ komenton, bonvolu ankaŭ ĉiun respondon skribi sur aparta papero kaj neniam forgesi la rilatan numeron. Sed nia ĉefa peto estas: Estu koncizaj! Ni dankas anticipe pro via bonvola kunlaborado.

*

Lingvaj demandoj.

1. Malarmado, senarmigo.

En la nuna tempo oni ofte legas tiujn ĉi formojn. Kiu el ili estas korekta?

2. Movi, movigi, moviĝi.

a) Kelkfoje oni legas: movi maŝinon; aliffoje: movigi maŝinon. Kio estas korekta?

b) Ĉu oni povas diri: La maŝino movas, anstataŭ: La maŝino moviĝas?

3. De antaŭ, de post.

Mi trovis la jenan frazon: „Preskaŭ jam de antaŭ kvin jarcentoj oni konas la presarton.“ Tio ŝajnas al mi nekutima. Kutime oni legas: de post. (A. J.)

4. Refleksivo; ŝanĝo de senco per neĝustaloka apliko.

Ĉu korekta estas la frazo: „Tiuj tri kuraĝaj viroj faris la unuajn flugojn kaj paroligis la tutan homaron pri si“?

5. Singularo — pluralo.

Mi trovis la jenan frazon: „Duono de la paĝoj estu surprisita, kaj duono estu liberaj.“ Ĉu la pluralo estas korekta? (A. J.)

6. Interpunkcio.

„Mi nun bone komprenis ke mia s-ano D. eraris, kaj supozis ke anglo estas verkinto de la aŭtobiografio.“ (El letero de s-ino S. al Heroldo.) Ĉu la komo estas korekta?

7. Antaŭ ol — antaŭ kiam.

Kelkfoje oni legas antaŭ kiam anstataŭ antaŭ ol. Mi lernis, ke antaŭ ol estas la sole korekta formo. (P. M.)

8. Tempoformo (estis -ata, estis -ita).

En Heroldo 568 (De mardo al mardo) mi legas: „La aŭstra kabineto Buresch demisiis. La ĝisnuna kanceliero Buresch estis ree komisiata formi novan registaron.“ Ĉar la komisiono jam pasis (kiam la leganto legas la informon), kaj la participo de l' pasinteco ja estas -ita, ĉu oni ne devas diri ke Buresch „estis ree komisiita“?

9. Tempoformo (estos -ata, estos -ita).

Patro volas diri al filo, ke li ricevos punon, se li ne obeos. Ĉu la patro devas diri: Se vi ne obeos, vi estos punata, aŭ: punita? Mi opinias, ke oni devas diri punita, ĉar se oni minacas nur per la ago de punado sed ne per la kompleta fakto (-ita), la knabo ne timos. (K.)

10. Participo.

En leteroj de francaj samideanoj oni ofte trovas uzadon de participo en formo nekutima, ekz.: „La malamiko venkita, la generalo laŭdiĝis siajn soldatojn.“ Ĉu tio estas permesebla?

11. Akuzativo.

Sur Esperantaj programoj oni vidas jen: „Dimanĉon, la 6-an de marto“, jen: „Dimanĉo, la 6-a de marto“. Kio estas korekta? Same sur leteroj oni trovas kutime: „S-ro A., (aŭ:) S-ino B.“ Ĉu oni ne devas skribi: „S-ron A., (aŭ:) S-inon B.“, ĉar la adreso signifas ja la direkton, al kiu la letero estas sendota?

12. Se — ĉu.

„Petro ankoraŭ ne decidis, se li venos.“ — „Mi skribos, se mi havos tempon.“ — Ŝajnas al mi, ke en tiuj ĉi du frazoj ĉerpitaj el leteroj de samideanoj ambaŭfoje se estas erare skribita anstataŭ ĉu. Ĉu mi estas prava? (M. W.)

*

Respondoj.

1. Malarmado, senarmigo.

La radiko arm havas verban signifon. Pro tio malarm(ad)o sendube estas korekta. Senarmigo estas malpli rekomendinda, kvankam oni povas permesi ĝian uzon laŭ la principo de sufiĉo, anstataŭ senarmiligo. Komparu: sendependa, anst. sendependeca (= sen sendependeco, sen dependo).

2. Movi, movigi, moviĝi.

a) Ambaŭ formoj povas esti korektaj. Sed ekzistas diferenco de senco: movi maŝinon = movi maŝinon de unu loko al alia; movigi maŝinon = igi (kaŭzi), ke la maŝino moviĝas (ekz., ke ĝiaj radoj turniĝas). Same: ruli ŝtonegon, kaj: ruligi ŝtonegon. Oni povas ruli ŝtonegon supren aŭ malsupren, sed oni povas ruligi ĝin nur malsupren (igi ke ĝi ruliĝas). -igi povas signifi: -antigi, -atigi kaj -iĝigi.

b) La maŝino movas (la ŝtono rulas, la kunsido komencas) estas senobjektaj formoj, kiujn oni povas pravigi per la principo de sufiĉo; sed estas konsilinde uzi la plenajn formojn: la maŝino moviĝas, la ŝtono ruliĝas, la kunsido komenciĝas. La formoj „la maŝino movas, la ŝtono rulas“ kaj similaĵ kutime estas rigardataj kiel eraroj, dum la formon „la kunsido komencas“ oni trovas eĉ en bonaj gazetoj aŭ libroj.

3. De antaŭ, de post.

Efektive, de post ofte estas erare uzata. „De post kvin jarcentoj“ signifus „de post la jaro 2432“. Sed „de antaŭ kvin jarcentoj“ = „de post la jaro 1432“.

4. Refleksivo.

La frazo estas nekorekta pro neĝustaloka apliko de „pri si“; ĝi devas stari antaŭ „paroligis“: Tiuj tri kuraĝaj viroj faris la

unuajn flugojn kaj pri si paroligis la tutan homaron.

5. Singularo — pluralo.

Jes, en la citita ekzemplo la pluralo estas korekta; ĉar sen ĝi la senco estus tute diferenca. „Duono de la paĝoj estu surprisita, kaj duono estu libera“ signifus, ke ĉiu unuopa paĝo estu nur duone surprisita kaj duone libera.

6. Interpunkcio.

En la citita ekzemplo la komo estas nekorekta, ĉar ĝi kaŭzas miskomprenon, S-ino S. celas diri ke „s-ano D. supozis ke anglo ktp.“, sed pro la komo oni komprenas ke s-ino S. mem supozis. Se oni volas apliki komojn, oni povas meti tiajn antaŭ la du „ke“.

7. Antaŭ ol — antaŭ kiam.

Laŭ nia opinio, estas preferinde uzi antaŭ kiam, analoge al post kiam. Ankaŭ Kabe uzis antaŭ kiam anstataŭ antaŭ ol. Plj korekta ol antaŭ ol estus antaŭe ol. Sed antaŭ ol estas sankciita de la kutimo.

8. Tempoformo (estis -ata, estis -ita).

En la nomita frazo oni ne povas diri ke Buresch „estis ree komisiita“; ĉar la is-ita-formo (pluskvamperfekto) signifas la antaŭpasintecan. Estis komisiita signifus, ke la komisio okazis jam antaŭ la demisio, — kio estus kontraŭsenco. La pasinteco jam estas esprimita per -is en estis. Cetero, la pasiva formo estis komisiata estas analoge al la aktiva demisiis. Se ni interŝanĝus la frazojn, ili devus teksti jene: „La ĝisnuna aŭstra kanceliero Buresch estis rec komisiata formi novan kabineton; lia kabineto estis demisiinta“ — ĉar la demisio okazis antaŭ la komisio, do ĝi estis antaŭtempa rilate al ĝi. Komparu ankaŭ:

La kabineto demisias.

La kanceliero estas komisiata.

La kabineto demisiis.

La kanceliero estis komisiata.

9. Tempoformo (estos -ata, estos -ita).

La argumento ŝajnas al ni ne decida. Sendube la formo „punata“ (la ago) estas la pli proksima, kaj „punita“ (la fakto) la malpli proksima. Oni tamen ne povas aserti, ke la unua formo estas la sola korekta, kaj la dua tute ne estas korekta. Ni preferas la unuan. Alia afero estas pri gazeto redaktita, urbo iluminita; tie oni pensas pli multe pri la kompleta fakto ol pri la ago. Do, oni preferas diri: la gazeto estas (estis, estos) bone redaktita; la urbo estas (estis, estos) bele iluminita, kvankam ankaŭ la formoj kun -ata estas korektaj sed havas diferencon sencon.

10. Participo.

Ĝis nun tia uzado de l' participo, kia estas montrita en la ekzemplo, ne estas permesita. Oni devas diri: „Post venko de (super) la malamiko, la generalo laŭdis siajn soldatojn“, aŭ: „Venkinte la malamikon, la generalo laŭdis siajn soldatojn, (aŭ, depende de la senco: la soldatoj estis laŭdataj de la generalo“. Tamen, laŭ nia opinio, se la Akademio permesus tian uzadon de l' participo, ni ne vidus en tio malutilon, sed pliriĉigon de la Esperanta stilo kaj plisimpligon de multaj frazoj.

11. Akuzativo.

Akuzativo en la nomitaj kazoj sendube estas korekta; sed ankaŭ la nominativon oni povas permesi, supozante ke ĝi estas mallongigo de „Je dimanĉo“ aŭ „Al s-ro“. Sed la daton sur leterfolioj oni kutimas skribi en akuzativo: „Parizo, la 15-an de febru-

aro 1932“, kvankam oni rajtas ankaŭ skribi: „(En) Parizo, je la 15-a de februaro 1932“.

12. Se — ĉu.

Pri la unua frazo vi estas prava. Ofte oni trovas tiun eraron: la anstataŭadon de ĉu per se. En la dua frazo ambaŭ vortoj estas aplikeblaj, sed ili rezultigas diferencon

sencon: 1. „Mi skribos, se mi havos tempon“ signifas, ke la koncerna persona nur skribos, se ĝi havos tempon, kaj ke ĝi ne skribos, se ĝi ne havos tempon. — 2. „Mi skribos, ĉu mi havos tempon“ signifas, ke la koncerna persono certe skribos kaj indikos, ĉu ĝi havos tempon, aŭ ĉu ĝi ne havos tempon.

Reguloj kaj formuloj.

De G. Schattat.

En la lastaj jardekoj la scienca logiko provas, esprimi siajn tezojn per matematikaj aŭ similaj formuloj. Ankaŭ al lingvaj reguloj oni povas doni tiajn formulojn kun la rezulto, ke la reguloj mallongiĝas.

Granda eraro estas la idista teorio, ke nura radiko ne havas karakteron substantivan, adjektivan ktp., sed ke tiun karakteron ĝi ricevas de la finaĵo. La signifoj de la diverskarakteraj radikoj estas:

substantiva radiko = substancaĵo (persono,

besto, objekto, substanco),

verba radiko = ago (movo, konscia spirita ago, influo),

adjektiva radiko = io nedisigebla, rimark- ebla ĉe substancaĵo,

adverba radiko = io nedisigebla, rimarkebla ĉe ago,

prepozicia radiko = rilato al substancaĵo,

konjunkcia radiko = rilato al ago.

*

Por formuloj oni bezonas mallongiĝojn, ekz.: substantiva radiko = sob, verba radiko = vib, adjektiva radiko = daj, prepozicia radiko = je.

La plej gravaj formuloj de l' Esperanta vortfarado tiukaze estas:

1. vibo = vibajo + vibado
2. dajo = dajaĵo + dajeco
3. soba, sobe = jesobo
4. viba 1 = vib-povanta, vib-helppovanta
5. viba 2, vibe = jevibo
6. personi, besto = agi kiel persono, besto
7. objekti, substanci = agi per objekto, substanco
8. daji = esti daja.

Al tiuj ok formuloj korespondas jenaj reguloj:

Derivita substantivo.

Formulo 1: Verba radiko kun finaĵo o povas signifi tiun radikon kun „ajo“ kaj kun „ado“. Ekz. „manĝo“ povas esti manĝaĵo kaj manĝado; „manĝo“ estas rekomendinda, se oni opinias ambaŭ signifojn.

Formulo 2: Adjektiva radiko kun finaĵo o povas signifi tiun radikon kun „ajo“ kaj kun „eco“. Ekz. „ruĝo“ povas esti ruĝaĵo kaj ruĝeco; „ruĝo“ estas rekomendinda, se oni opinias ambaŭ signifojn.

Derivitaj adjektivo kaj adverbo.

Formulo 3: Substantiva radiko kun finaĵo a, e signifas la substantivon kun antaŭa prepozicio. Ekz. „reĝa domo“ = domo de reĝo, laŭ reĝo; „reĝe regali“ = regali laŭ reĝo.

Formulo 4: Verba radiko kun finaĵo a povas signifi tiun radikon kun „povanta“ kaj kun „helppovanta“. Ekz. muzika aparato povas muziki, muzika disko povas helpi muziki.

Formulo 5: Sed verba radiko kun finaĵo a povas ankaŭ signifi tiun radikon kun finaĵo o kaj kun antaŭa prepozicio. Ekz. muzika sono = sono de muziko.

Ankaŭ kun finaĵo e la verba radiko signifas tiun radikon kun finaĵo o kaj kun antaŭa prepozicio. Ekz. muzike prezenti = prezenti per muziko, kun muziko.

Derivita verbo.

Formulo 6: Substantiva radiko de persono aŭ besto kun finaĵo i signifas „agi kiel“ tiu persono aŭ besto. Ekz. majstri la vivon = agi kiel majstro al la vivo.

Formulo 7: Substantiva radiko de objekto aŭ substanco kun finaĵo i signifas „agi per“ tiu objekto aŭ substanco. Ekz. marteli = agi per martelo (al io); sali = agi per salo (al io).

Formulo 8: Adjektiva radiko kun finaĵo i signifas „esti“ tia. Ekz. granda = esti granda.

*

Derivo de la malmultaj adverbaj radikoj ne estas preparolita ĉi-supre, ĉar ĝi fariĝas malpli simpla pro eliminado de la verba radiko; ekz. „rapido de ĉevalo“ anstataŭ rapido de l' kuro de ĉevalo.

(Pluajn sciigojn oni povas trovi en la germanlingva libro de la sama aŭtoro: „Einführung in die deutsche Sprachlehre“ [0.75 gmk.], havebla ĉe la Librofako de Heroldo.)

Lingvaj notoj.

De William Bailley, akademiano.

Pri la prepozicio „da“.

„Da post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro.“ Sed tio ne signifas, ke post tia vorto ni devas ĉiam uzi da. Se la sekvanta vorto aŭ esprimo havas signifon de mezuro, da (aŭ en kelkaj okazoj el) estas preferinda. Tiel ni diras: sumo da mono kaj sumo de ok frankoj; ok frankoj da elspezo kaj elspezo de ok frankoj; ducent kilometroj da longo kaj longo de ducent kilometroj; vico da domoj kaj vico de (aŭ el) dudek domoj. (Komparu F. K. 181/22.)

En la Fundamenta Krestomatio troviĝas kvar frazoj kun prepozicioj ne bone elektitaj: 8 dolaroj de (da) semajnaj enspezoj (116/27); 90 metroj de (da) alto (196/27); spacon da (de) 250 000 hektaroj; centimetro de (da) larĝeco (225/31).

Da taŭgas ne sole por difinitaj mezuroj, sed ankaŭ por kvantoj ne difinitaj, ekzemple: glaso da vino, vazo da oleo, kruĉo da akvo. Por ĉi tiu lasta senco ni povas ankaŭ uzi kun, ekzemple: bastajon kun terpomoj (F. K. 120/8); saketo kun pulvo (F. K. 324/34); veturilon kun greno (La Rabistoj

42/21); boteleton kun veneno (La Rabistoj 74/11); pladon kun lakto (Fabeloj II. 40/34); sakon kun mono (Sentencoj VII, 20).

Laŭ sia difino en la Universala Vortaro la sufikso **on** esprimas ne kvanton, sed proporcion. Sekve la formoj **duono da horo**, **duono da franko** k. c. ne estas ĝustaj. La unua montras kvanton da tempo, sed ne kvanton da horo; la dua montras kvanton da mono, sed ne kvanton da franko. Anstataŭ la unua ni devas diri **duono de horo**, **duonhoru**, aŭ **horuono**; anstataŭ la dua — **duono de franko**, **duonfranku**, aŭ **frankuono**. En la unua tempo de la lingvo oni ne multe zorgis pri tiu afero; sekve en la Fundamenta Krestomatio ni havas la ne ĝustajn formojn **duono da horo** (123/4, 126/5, 172/23, 310/31), **duono da jaro** (128/35), **duono da dolaro** (110/29), **duono da centimetro** (229/6, 25, 227/17), **duono da pantranĉo** (82/24), **kvarono da horo** (73/35, 291/13). Ni havas ankaŭ la pli bonajn formojn **duonhoru** (291/30, 31, 292/9) kaj **duonjaro** (229/24), kaj en la lasta tempo Zamenhof venis al la plej bona: **horkvarono** (Fabeloj de Andersen, unua parto, 82/37, 95/27), konforme al la regulo 11: „la ĉefa vorto staras en la fino“.

Tamen ni ne devas diri, ke da post **duono** estas ĉiam malĝusta; ekzemple la esprimo **kvar kaj duono da frankoj** (Ekzercaro § 14) estas bona, ĉar kvar kaj duonon esprimas kvanton.

*

Pri „kelkaj“ kaj „kelke da“.

En unu el la Lingvaj Respondoj (p. 64 en la plena kolekto) Zamenhof montris la diferencon inter multaj kaj multe da. En la Ekzercaro (§ 32) troviĝas la ekzemploj: **Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn landojn. Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj.**

Tuj poste staras du frazoj, kiuj montras, ke tia sama diferenco ekzistas inter **kelkaj** kaj **kelke da**: **Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj. En la ĉambro sidis nur kelke da homoj.**

Sekve ni povas diri: **kelkaj homoj** = diversaj homoj (ĉiu aparte); **kelke da homoj** = ia negranda nombro da homoj (kune).

Kiam ni parolas pri sinsekvaj horoj, tagoj, semajnoj, jaroj k. c., **kelke da** estas preferinda.

Notoj pri Occidental.

(Fino.)

De Esplorinto.

6. Ĉu la Okcidentalistoj povas kun pura konscienco riproĉi al la Esperantistoj la uzon de arbitraĵoj, aŭ ĉu ili mem enkontra-bandis kelkajn en la vortaron?

Por respondi al tiuj demandoj, ni ekzamenu laŭvice la ortografion, prononcon, gramatikon, vortfaradon kaj vortprovizon de Occidental.

Ortografio kaj prononco.

Neniel la principo de unu valoro por ĉiu simbolo!

1. Oscilo inter **th/t**; **ph/p**; **chr/cr**; **chl/cl** (du alternativoj). Oscilo inter **apporter** ktp. **adporter** ktp. **aportar** ktp. (tri alternativoj).

2. **Ch** havas tri valorojn: I. ĉ; II. ĥ (post konsonanto kaj post **y**); III. k aŭ ĥ (!) en **chl**, **chr**, **chn**. Oni devas kontraŭstari al II:

a) pro ĝia malfacileco por angloj kaj francoj, pro kio Esperanto jam multe limigis la uzon de **ĥ**;

b) en vorto kia **psyche** la prononco de **ĥ** (kiel en germana **machen**) estas ankaŭ por germanoj ne tiom natura kiel la **ch** de **ich**.

3. **Y** (= germana **ü**) kaj **eu** (= germana **ö**) estas tre malfacilaj sonoj por angloj. Prave evitataj en Esperanto!

4. Oni ne vidas la kialon por la diferenco de **z = dz**, kaj **zz = c**.

5. Tre konfuziga estas la apudeco de **l'** (se vere „**mouillé**“ tre malfacila por la angloj!), **li** (kun tre mallonga **i** postakĉenta) kaj **ll**: ekz. **orgul'e**, **filio**, **cavall**. Kelkfoje troviĝas osciloj: **email/ema'll**.

6. La duoblaj literoj ne estas ĉiam uzataj laŭ internaciaj konvencioj: **mudde** (a. **mud**), **cavall**, **cigarr** (ambaŭ sen finvokalo).

7. Ne ekzistas diftongoj, do oni devas disigi la vokalgrupon **aeronaút**, **póinter**. Kiel prononci **drogue**?

8. Tro komplikaj estas kompare kun Esperanto la reguloj pri akcentado. La intenco estas konservi la internacian akcenton, sed

a) ili ne ĉiam sukcesas, ekz. **leibll** „legebla“ kaj

b) tuta aro da vortoj devas eĉ tiam porti skribitan akcentsignon!

Morfologio.

En la morfologio ni atentigas pri jenaj plejparte ĝenantaj neregulaj fenomenoj aŭ superfluaĵoj:

1. Kvankam la substantivo kaj adjektivo ne havas akuzativon, oni trovas tiun kazon en la personaj pronomoj (**me**, **te**, **les** ktp.) — sed ne en la demonstrativoj! — kaj en la persona relativo **quem**, sed ne en la neŭtra.

2. Se la pluralsigno estas **-s**, pro kio **mann**, **cigarr**, ktp. havas **-es**? Kio estas ia pluralo de **quem**? Ĉu la pluralo de **chascun** estas **chascunes** aŭ **chascuns**?

3. Nenecesa ŝajnas la multobligo de la artikolo difina **li + lo**, **la**, **lu**, **lis**. Neniu regulo fiksas la aplikon de la nedifina artikolo **un**. La distingo de tri formoj, ekz. **mann**, **un mann**, **li mann** ne estos facila por la slavoj kaj finnoj. La okcidentaj nacilingvoj (angl., fr., germ.) diferencas inter si rilate al la uzo kaj neuzo de **un**. Do, nenecesa komplikajo.

4. Ankaŭ troviĝas embaraso pro riĉeco rilate al

a) pronomoj personaj: **yo + me** (yo estas hispana, ne internacia!)

b) pronomoj posedaj: **mi + mu + mei** ktp. (tu = ĉi kaj ĉia!)

c) adverboj: **bell-men**, **subit-men**, sed **noctli**, **preferli**, **unésimll**. (Oni diras **-men** post adjektivo kaj **-ll** post aliaj vortspecoj: senutila komplikajo, aparte bedaŭrinda pro la nekutima kunmeto de **-ll**, angla sufikso, kun latindevenaj radikoj; krome oni komparu **-ment** en fr. **nuitamment**, **premièrement**!)

d) verboj: I. neniŭ distingo inter **amat** partitivo kaj **preterito**,

II. kaj samtempe du formoj samsignifaj **amat**, **fe amar** por la **preterito**.

Vortfarado.

En la vortfarado ni renkontas jenajn necesajn komplikajojn:

a) Aro da fonetike tre similaj kaj konfuzemaj afiksoj, ekz. **des-** (= mal-) **dis-** (= dis-); **in-** (negativa) / **in-** (= en); **-ett** (= -ĉjo, -njo) / **-ette** (= -aĵeto, -ileto); **-ade** / **ada**, t. e. -da post a-verbo, ekz. **parlada**; **-age** (= -aro) / **ag(i)e** (= -ado, -aĵo); **-essa** (= -ino) / **-ess(e)** (= -eco); **-ia** (= ejo) / **-le** (= eco); **-iera** (= -ejo) / **-iere** (= ujo); **(i)tá** (= eco) / **-(i)té** (= aro); **-or** (= -aĵto) / **-ore** (= -eco); **-isar** (= igi) / **-izar** (= -i).

b) La funkcio aŭ signifo de la sufiksoj estas ofte tre malklara: krom **-e** („ohne spezielle Bedeutung“ = sen speciala signifo), **-a** (= -ado, -ejo, -tempo, -aro, -ino ktp.), **-o** kaj **-u** — ĉiuj tiel nomitaj „nuancigantaj finaĵoj“ —, ni trovas ke **ag(i)e** signifas agon, rezulton, lokon, tempon, ilon, pagon; **-essa** ne nur virinojn, sed ankaŭ „ŝatatajn aŭ timatajn bestojn“; **-al** („allgemeine adjektivische Beziehung“ = ĝenerala adjektiva rilato, kvazaŭ tiu rilato estus per si tute klara kaj memevidenta); **-icar** („keine bestimmte Bedeutung, gewöhnlich transitiv“ = nenia difinita signifo, ordinare transitiva!)

c) Por unu funkcio aŭ grupoj de funkcio oni trovas tre malfacile distingeblajn derivilojn, ekz. la nocio de „kolekto“ esprimiĝas per 1. **-ade** (**colonnade**), 2. **-age** (kun la ideo de io aranĝita!) ekz. **foliage**, **boscage**, 3. **al'a** (senorda!) ekz. **antiqu'al'a**, 4. **-arium**, ekz. **radicarum**, 5. **-(i)té** (kun adjektivoj) ekz. **parentité**, **homanité**: kvin sufiksoj por la Esperanta kaj **Ida -aro!** Malŝato trovas nuancigitan esprimon per 1. **-ach**, 2. **-uch**, 3. **-ard**, 4. **-on**. Vazo estas 1. **-iere** (kun substantivoj), 2. **-uor** (kun verboj).

d) En kunmetitaj vortoj la determinanto ne ĉiam troviĝas antaŭ la determinato, kiel en Esperanto: oni trovas apud **postmann**, **svimarte** formojn kiaj **garda-manĝage** (= nutraĵejo), **garda-via** („Weichenstelle“ = relkomutisto) ktp., — do, krom la nereguleco de la pozicio, ankaŭ duba senco pri signifo, ĉar **garda-manĝage** estas ejo kaj **garda-via** homo!

Vortprovizo.

La celo de tia riĉeco de afiksoj estas atingi maksimuman internaciecon. Sed kiam oni ekzamenas la vortaron, oni miras pro la aŭdaco de kelkaj Okcidentalistoj, kiuj atakas Esperanton pro ĝia esotera karaktero. Jen kelkaj frapantaj ne-internaciaĵoj: **foxessa**, **limitítá**, **immanuar**, **temporan**, **raspic**, **rebellíc**, **selfíc**, **inglassar**, **vorage**, **stulton**, **trigemell**, **ossage**, **sordidage**, **lucrar**, **sapientar**, **unguentos**, **sriacher**, **frissonatíf**, **nordal**, **developation**, **usation** kaj centoj plue!

Aliflanke mankas ŝajne granda nombro da vere internaciaj sufiksderivajoj, ekz. **development**, **dénouement**, **discernment**, **lineament** ktp.

Tre ofte oni devas elekti inter du aŭ pluraj alternativoj (se oni fanfaronas pri la pli granda riĉeco de la Occidental'a afiksaro, ni povas almenaŭ postuli pli klaran gvidadon pri la utiligo de tiaj riĉaĵoj!): **payament** / **payation**; **rectifílineal** / **rectifílineari**; **pavament** / **pavage**; **gubernament** / **gubernia** (kun alia senco?); **furlon** / **furiard**; **parlatoria** / **parluore**; **plantage** / **plantage** / **plantation**; **scrition** / **scritura**; **reyina** / **reyessa**; **nordal** / **nordic**; **rondore** / **rondesse**; **grandore** / **grandess**; **altore** / **altess** (ŝajne kun signifo „Hoheit“); **presteria** /

prestatoria; vole / volentie / volition / volunté; trison / terzette ktp. Multaj el la alternativoj estas ne-internaciaj.

Ankoraŭ pli serioza malfacilaĵo estas la svarmo de alternativaj radikoj, ekz. **postmann / epistolero / lettero; vite / sarment; slamm / mudde / fang; inviar / misser; fonder / fuser; natation / svimate; haltar / stopar; drachal'a / pleva; utular** (internacia?) / brular; vel'on / vel'ard / grison / seniard / old mann; quancam / etsi (post tio la Okcidentalistoj kuraĝu riproĉi al Esperanto la malinternaciecon, tial ke Esperanto uzas sed kaj kaj!); **vulnerar / leder / damagear; prohibir / interdix / interdixter; benevenit / bonvenit.**

Resumo.

El ĉiuj projektoj Occidental estas por la anglo (kaj eble por la franco) unuavide — kaj precipe ĉe tiucele elektitaj tekstprovoj — la plej natura kaj simila al ilia propra lingvo, kaj tiu aspekto havas sendube grandan propagandan valoron. Sed kiam oni eĉ iomete penetras sub la surfaceton, oni mirigas pro la nekonsistencaĵoj kaj malfacilaĵoj ne nur superfluaĵoj, sed ankaŭ neinternaciaĵoj! Kelkajn oni povas alskribi al la manko de iu ajn menciinda „tradicio“. La verkanto de la vortaro ne scias kiun formon rekomendi pro tio ke la uzado ankoraŭ ne fiksigiĝis. Sed la kumeto de la tuta vortaro elmontras la mankon precipe de tiaj vere sciencaj esploroj, sen kiaj oni ne bone povas difini kio estas vera internacieco en la vortaro kaj kiuj internaciaĵoj rajtas postuli enlason kaj kiuj ne. Traserĉi la nacilingvaj vortarojn kaj komputi la nombron de la lingvoj (laŭ la ofte misuzita formulo DEFIRS) tute ne sufiĉas; oni devas 1. zorge eltrovi en kiaj sferoj aŭ fakoj la koncerna esprimo troviĝas; 2. post bona konsidero elekti la plej oportunan senceton, ĉar la „internaciaĵ“ vortoj estas tre ofte embuskoj kaj falgiloj (vidu ekz. *Les faux amis ou les trahisons du vocabulaire anglais* de Koessler kaj Derocquigny, Parizo 1928); 3. eviti la enmeton de embarasanta nombro de sinonimoj aŭ de nur nuancete malsimilaj radikvortoj; 4. elektante kiel plej internacian bazon la latinidajn lingvojn, oni nepre devas montri taktan senceton de stilo (en Occidental ŝokas min la senpera apudeco de anglaj esprimoj, ekz. **self, mey, ples**, kaj la internaciaj latinaj vortoj).

Ni Esperantistoj tute ne bezonas honti pri la fakto ke por la plejmulto de edukitaj (kaj precipe poliglotoj) personoj de Eŭropo nia lingvo ne estas unue tiom facile „legebla“ kiom Occidental. Tion ni senkaŝe konfesu, sed insiste prezentu la avantaĝojn de nia lingvo.

Se oni asertas ke Esperanto estas esotera, ni povas indiki la grandegan nombron de internaciaj radikoj, sed super ĉio certigi ke post bagatela studotempo ĉiu, eĉ la plej malpoliglota laboristo, sukcesas akiri tiun „esoteraĵon“ kaj ne nur akiri por legi, sed ankaŭ por paroli kaj skribi ĝin senhezite kaj kvazaŭ instinkte. Favorate de nia reguleco de prononco ni neniam devus dubi pri la elparolo kaj precipe la akcentado de vorto, subtenate de nia logike ekonomia sistemo de vortfarado ni neniam devas serĉi kaj serĉi por trovi la plej taŭgan sufikson kaj ne embarasate per granda nombro de radikoj ni ne devas tro streĉi nian memorpovon.

Certe, ni rajtas diri, ke la uzo skriba kaj parola de Esperanto almenaŭ kelkrilate estas pli facile akirebla ol tiu de Occidental, ĉar 1. estas pli facile lerni kaj memori unu formon anstataŭ du aŭ tri; 2. eĉ se la lern-

anto jam konas la internaciajn vortojn de sia gepatra kaj aliaj najbaraj lingvoj, li ne bone scias en Occidental ĝis kie lia libereco uzi la apartajn derivaĵojn al li bone konatajn iras — psikologoj povus decidi, ĉu ne estas, precipe por la poliglotoj, eĉ pli facile lerni lingvon sen tre granda nombro da similaĵoj al la de li konataj lingvoj (anglo scipovanta hispanan kaj italan aŭ danan kaj svedan lingvojn ofte emas konfuzi ilin).

Restas ankoraŭ unu punkto diskutenda. Oni diras ke la internaciaj esprimoj en Esperanto estas „fremdkorpoj“. Sed tio tute ne estas malavantaĝo. Se ni distingas inter la ĉiutaga lingvo en Esperanto (kiu verdire estas sendependa, aŭtonoma kaj pro tio, supraĵavide, „esotera“) kaj la teknika vortaro, ni povas ĝoji pro tio ke por niaj teknikaj celoj ni povas pruntepreni la internaciismajn jam konstruitajn, sen ke ni devus timi enporti konfuzon en nian sufiksaron. Ni ĝuas la avantaĝojn de vere internacia teknika vortaro sen la danĝeroj kaj maloportunaĵoj de Occidental.

Ni daŭrigu evoluigi Esperanton laŭ ĝiaj propraj leĝoj, riĉigante ĝin laŭokaze, sed evitante la absurdan lukson de Occidental.

LINGVA TRIBUNO

Pri la uzo de „kio“ kiel relativo.

Kun tre granda intereso mi legis la studon de s-ro Meguru Takahaŝi pri la uzado de **kio**, kiel relativo al „neŭtra adjektivo substantivigita“.

Mallonge mi deziras nun konigi la rezulton, kiun atingis mia simpla saĝo post esploro de la ekzemploj cititaj de s-ro Takahaŝi por montri ke, foje, D-ro Zamenhof alprenis „forigendan germanismon“. Sufiĉas cetere konsideri du el tiuj ekzemploj:

I. El La Batalo de l' Vivo:

„La sola, kion li klare vidis, ktp.“

La simpla homo, kiu mi estas, restarigas vorteton subkomprenitan kaj skribas:

„La sola (io), kion li klare vidis, ktp.“

Francoj dirus: „La seule chose qu'il voyait clairement, etc.“

II. El Virineto de Maro:

„Li pensis, ke la blanka, kion li vidis, estis nur ŝaŭmo sur la akvo.“

Same ni subkomprenu io post **blanka**, kaj la uzo de **kio** tuj aperos natura kaj konforma je la regulo donita de la ĝisnunaj gramatikistoj. Ankaŭ, franclingve, la fraze studata fariĝus: „Il pensa que le **quelque chose de blanc** qu'il avait vu, etc.“

Io kaj **chose** aŭ **quelque chose** egale esprimas nedefinitan aĵon aŭ **ulon**, kaj la norma korelativo estas **kio**.

Komprenoble en la sekvantaj ekzemploj kun **kio** estas tute alie, ĉar temas pri difinitaj aĵoj aŭ uloj, kaj oni ne povas en ili subkompreni ajnan korelativan vorton finiĝantan per **o**. Sekve, „la blankaĵon, **kion** li vidis“ estas plumb- aŭ pres-eraro anstataŭenda per **kiun**.

Tial la demando aperas al mi malpli komplika ol al s-ro Takahaŝi. Eble nur tial, ke mi estas ne sufiĉe sperta lingvisto.

Georges Avril, Nice.

Relativ-pronome „kio“.

De G. Schattat.

(Ril. al Lingva Kritiko p. 3, 4.)

La gvidpensoj pri la uzado de „kio“ kaj „klu“ estas:

- „kio“ anstataŭas substantivon, „kio“ rilatas al substantivo,
- „kio“ povas rilati al tabelvortoj kun **o** (io, tio, ĉio, menio), ĉar ili ne estas veraj substantivoj;
- „kio“ povas anstataŭi substantivon, se „kio“ signifas „kiu!“ (? — Red.) = kiu ulo (kiu persono, kiu besto).

La formon „kiu!“ oni evitas pro tio, ke ĝi malbone taŭgas por aldone de la finaĵoj j kaj n.

*

Rigardante la citaĵojn en la artikolo de s-ro Takahaŝi, oni povas konstati, ke ordinare:

- en frazoj kun „kio“ **mankas** antaŭa kunkompensata substantivo kaj oni ne opinias „kiu!“,
- en frazoj kun „kio“ **ekzistas** antaŭa kunkompensata substantivo aŭ oni opinias „kiu!“.

*

La artikolo nomas kelkajn esceptojn, sed la font-indikoj ne estas ĝustaj laŭ miaj libroj: „la blankaĵo, kion“ ne estas en 65/5 sed en 65/7 de Fabeloj I; „la plej bona, kiun“ ne estas en Fabeloj II sed en Fabeloj I p. 65/22, do sur la sama paĝo! La esprimo „la plej bona, kiun“ ne troviĝas en mia Fundamenta Krestomatio p. 261/17, sed en 261/23 mi trovas: „la plej bona parto, kiun“.

Esceptoj do estas:

- „la blankaĵo, kion“ kaj „la plej bona, kiun“, ambaŭ sur p. 65 de Fabeloj I. Oni rajtas supozi, ke Zamenhof skribis tiun paĝon eksterordinare rapide kaj tial ne rimarkis la skrib-erarojn.
- „la plej alta, kiu brilis . . . estis Parnaso“. Oni kunkompensas „monto“ kaj rigardas ĝin kiel personon (germane: personifizieren). Aliaĵe oni preferus „kio“.

Pri karesa sufikso.

Ni havas **-ĉj-** por viraj nomoj: Paĉjo, Joĉjo, ktp.

Ni havas **-nj-** por virinaj nomoj: Panjo, Manjo, ktp.

Pro manko de karesa sufikso por senseksaj nomoj, ni donas en multaj kazoj al **-et-**, kiu estas malgrandiga sufikso, la karesan signifon.

Laŭ la nederlandlingva ekzemplo, la sufikso: **-j(e)-** estas pli simpla kaj donas pli grandan uzeblecon por senseksaj kiel por seksaj nomoj. La sufikso: **-j(e)-** estas uzata post vortoj finiĝantaj per konsonanto; post vokaloj **-w-** (ŭ), **r**, **n**, **l**, oni antaŭirigas **-j(e)-** per **-t** = **tj(e)-** por la facila prononco; kiel en Esperanto per **-n-** en **ne+io** = **ne-n-io**.

Prova uzo de sufikso **-j-** post konsonantoj, kaj **-tj-** post vokaloj en Esp.-vortoj montros grandan uzeblecon por karesaj vortoj. Ekz.: **pa-tjo**, **patret-jo**, **patrin-jo**, **patrinet-jo**, **Jo-tjo**, **Johan-jo**, **Mari-tjo**, **Albert-jo**, **mia hejm-jo**, **mia dom-jo**, **domet-jo**, **mia edz-jo**, **edzet-jo**, **mia edzin-jo**, **mia-tjo** (mia kara), **amat-jo**, **amatin-jo**, **kat-jo**, **hund-jo**, **hundet-jo**. Kia feliĉo vidi vin, fraŭlin-jo! (amema esprimo).

La knabineto ludas per ŝia pupeto. Si kuŝigas ĝin en la liteton kaj diras ameme: „Mia pupjo (pupetjo), dormu bone!“; same kiel ŝia patrinjo diras al ŝi je la enlitiĝo: „Mia infanjo (infanetjo), dormu bone!“.

Ĉu la sufikso **-j-** ne estus uzinda almenaŭ por senseksaj nomoj?

Ach. De Maertejaere, Gent.